# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

**Jar-kotizoj:** Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MAJO/JUNIO 2006** **Nro. 65 (3/06)**



Kelkaj gelernantoj de la ĉi-jara E-kurso en la vaska universitato pozas kun la instruisto

# PRI LA PASINTA ĜENERALA ASEMBLEO.

Kiel anoncite, la 19an de majo, okazis la ĉiujara ĝenerala asembleo de nia asocio. Krom la devigaj punktoj de la tagordo, tiel kiel aprobo de la protokolo de antaŭa kunsido, aprobo de la kontostato de la pasinta jaro kaj aprobo de la buĝeto por la nuna jaro, oni pritraktis la maltranviligan situacion, kiu malfermiĝas antaŭ ni okaze de diversaj renovigoj en la konstruaĵo, kie troviĝas nia sidejo.

La plej multekosta afero estos la muntado de lifto, io petata de diversaj najbaroj kun movlimoj; ni ne rajtas kontraŭstari tiun decidon kaj, sekve, devos elspezi ĉirkaŭ 12.000 eŭroj.

Feliĉe, la EEU-Kongreso de la jaro 2004 estis profitdona kaj nun ni ne troviĝas en bankroto, sed tiu kvanto estas pli ol ni povas pagi. Dum la asembleo oni pripensis diversajn solvojn kaj fine, sur José L. Bringas kaj Jesús M. García falis la mendo okupiĝi pri la eblo trovi, ĝis la dato de la pago, profitdonan investon al nia ne tro multnombra mono.

Ankaŭ estis kelkaj vortoj por rememori la 100-jariĝon de la E-Grupo de Bilbao, kiu estos okazanta la sekvontan tagon, 20an de majo.



Kelkaj partoprenantoj en la ĝenerala asembleo

# FINO DE E-KURSO EN LA VASKA UNIVERSITATO.

La 31an de majo okazis la lasta klaso de la ĉi-jara E-kurso en la Vaska Universitato. Tiun tagon, nur la gelernantoj kiuj kutime ĉeestis la klasojn, rajtis plenumi ekzamenon; por la aliaj, estis nova ekzameno (la tiel nomata "fina") la 8an de junio.

Al la kurso aliĝis 20 homoj; 10 prezentiĝis al la ekzamenoj, sed nur 7 sukcesis. El ili, 6 estis virinoj kaj nur 1 viro.

Rimarkinda estas la fakto ke kelkaj el ili korespondis, pere de interreto, kun eksterlandaj samlingvanoj. Ankaŭ ili spektis la novan "Internacian Televidon", aŭskultis E-kanzonojn kaj, ĝenerale, ... ĝuis la kurson.

# PAGO DE JARKOTIZOJ.

Ni jam troviĝas meze de 2006 kaj, malgraŭ ke ni jam enspezis la kotizojn de tiuj, kiuj pagas pere de la ŝparkaso BBK, ankoraŭ kelkaj homoj, kies kontonumeron ni ne scias, ne pagis. Do, ni memorigas pri tio, ke ni ĉiuj devas pagi, kiel eble plej frue, tiun malgrandan kotizon. Se vi trovus ruĝan krucon maldekstre de tiu-ĉi paragrafo, tio tio signifas ke vi ankoraŭ ne pagis la kotizon por 2006.

Nia konto estas: **2095-0141-41-2218001550 (BBK)**

| | | |
|---|---|---|
| Kaj la kotizoj: | 14,00 eŭroj | (emerituloj, studentoj kaj senlaboruloj) |
| | 17,00 eŭroj | (kutima jarkotizo) |
| | 30,00 eŭroj | (familia) |

# PAGO DE CUOTAS.

Si a la izquierda de estas líneas encuentras una cruz roja, te recordamos que aun no has pagado la cuota correspondiente al presente año 2006, por lo que te rogamos que lo hagas en cuanto te sea posible.

Nuestra cuenta es: **2095-0141-41-2218001550 (BBK)**

| | | |
|---|---|---|
| Y las cuotas: | 14,00 eŭros | (jubilados, estudiantes y parados) |
| | 17,00 eŭroj | (Cuota normal) |
| | 30,00 eŭroj | (familiar) |

# CENTJARIĜO DE LA GRUPO.

La 20an de majo okazis la centjariĝo de la E-Grupo de Bilbao. Pro la proksimeco de la EEU-Kongreso de la jaro 2004 kaj pro manko de homoj pretaj organizi ĝin, ni ne sentis nin fortaj por okazigi specialan celebron.

Tre modeste, ni simple kunvokis ĝeneralan asembleon la 19an de majo kaj, la 20an, kelkaj kuraĝuloj kuniĝis en restoracio de Las Arenas. Certe ne okazis brila jubileo, despli ke en 1956 (50 jaroj) kaj en 1981 (75 jaroj) oni organizis kongresojn, sed ni devas adaptiĝi al la diversaj epokoj kaj, en la nuna, tio estas kion ni havas.

Tiu 20a de majo 1906, en la strato García Salazar, numero 12, 1a etaĝo dekstre, kuniĝis 37 homoj, kiuj aŭ lernis Esperanton aŭtodidakte aŭ simple interesiĝis pri la ekzisto de internacia lingvo, kunvokitaj de Teodoro Elizondo, por fondi la tiel nomata "Grupo Esperantista de Bilbao". Kiel unua Prezidanto oni elektis al Teodoro Elizondo; Vicprezidanto, Víctor Olegario Allende; Sekretario, Rufino Unzaga.

De tiam, la Grupo devis travivi tiun unue konvulsan, poste malhelan, malgajan kaj suferigan, kaj fine trankvilan kaj ekonomie floran jarcenton, kiun travivis la tutan Hispanion. De la unua epoko ni povas elstarigi fervorajn esperantistojn kiel Teodoro Elizondo kaj Víctor O. Allende; en la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento, gravuloj kiel Juan Gracia, konsilanto de la vaska registaro dum la intercivitana milito, kaj Santiago Aznar; aŭ Félix Díez Mateo, grava klerulo, patro de Díez Hochleitner, eks-Prezidanto de la "Klubo de Romo".

Post la intercivitana milito, la promenadoj ĉirkaŭ la "Nova Placo" de Bilbao, kun granda timo, ĉar Esperanto kaj la Grupo mem estis malpermesitaj; renaskiĝo kun la refondiĝo de la Grupo kaj la okazigo de hispana kongreso. Aperas homoj kiel Apraiz, Larrouy, Juanes, Liceranzu, Palacios, Izaola, Bustos, Mielgo, Otaola, Izaguirre, Ronda ....

Vigla etoso kaj multe da gejunuloj dum la 60aj kaj 70aj jaroj, kiam la sidejo de HEJS estis en Bilbao. Estas la epoko de M. Carmen Navarro, José Luis Bringas, Altuna, Pedro Benedicto, Iciar Arteche, Andrés Roales, fratinoj Castro. Ankaŭ de la neforgesebla Morales.

En la 80aj jaroj malfermiĝas tute nova epoko kun diversaj vojaĝoj de junaj esperantistoj tra la tuta Eŭropo por partopreni somerajn E-laborbrigadojn, kongresojn kaj aliajn renkontiĝojn. Ankaŭ hispana kongreso en la jaro 1.989. Estas la epoko de Santiago Martín, Jesús M. García, Salvador Díaz, Igone kaj Arantza Manciles, M. José Kaj Viki Ayllón, Cristina Carcedo, Javi García ...

Iom poste, aperas novaj homoj, kiuj multe helpas en la internaj aferoj de la Asocio; kelkaj foriris, aliaj restas. Estas la tempo de Teodoro Ibáñez, Sabin Orueta, Iñaki Vélez, Keti Sesmero, Igor Rapp, Andrés Plaza, Joxemari Sarasua, Ander Aguilar, David Mediavilla, Daniel Sampedro, José Pérez-Salado, Patxi de la Hoz ...

Meze de la 90aj jaroj, serioza ekonomia krizo batas nin kaj minacas malaperigi la Grupon; la problemo solviĝas pere de inĝenia kaj plensukcesa ideo: emisio de obligacioj, kun la devigo redoni la monon post 5 jaroj kaj eĉ eta interezo de 2%.

Kun la nova jarcento, alvenas io neniam antaŭe atingita: oficiala kurso en la Vaska Universitato, kiu ĉi-jare atingis jam la numeron 6. Bedaŭrinde, la celo de tiuj gelernantoj ne estas lerni Esperanton (almenaŭ, ne nur) kaj, ĝis nun, neniu el ili engaĝiĝis al la movado.

Kaj tiel ni alvenas al la jaro 2004, kiam okazis en Bilbao la Eŭrop-Unia E-Kongreso; lasta grava evento, kiu sukcesis aperigi nian Grupon kaj Esperanton en ĉiuj amaskomunikiloj.

Estis multe da gravaj datoj kaj multe da eventoj, ne ĉiam gajaj, precipe kiam la hispana milito de la jaroj 1936/39 sovaĝe trančis la normalan evoluon de la esperantismo en nia regiono, same kiel trančis la vivon de tuta generacio en ĉiuj flankoj. Tiuj homoj, kiuj sukcesis konservi la flamon de Esperanto en tiuj grizaj, malfacilaj kaj malgajaj jaroj postmilitaj eble estas kiuj devas vekigi en ni pli da admiro. En tiu-ĉi eta resumo de nia kara Grupo aperas multaj nomoj, sed estis multaj aliaj. Bedaŭrinde, ne estas loko por skribi ĉiujn; ni pardonpetas al tiuj ne menciitaj, sed ni memoras pri ĉiuj kaj dankas al ĉiuj ilian kontribuon al la plua ekzisto de la Grupo Esperantista de Bilbao.


Kaj nia agado daŭrigas ...

## KD PRI LA HISTORIO DE LA GRUPO.

Nia amiko Injaki Velez pretigis KDon kun tre kompleta kompilado de fotoj, prelegoj, biografietoj, datoj, ktp. de la 100-jara historio de nia Grupo.

Ĝis nun, li nur distribuis kelkajn kopiojn inter la plej proksimaj homoj, sed ni esperas ke li estu pli ambicia kaj tiu granda tasko farita ne mortu en la manoj de kelkaj privilegiuloj.

Kial tiu disko ne povas esti la kerno ĉirkaŭ kiu kuniĝu aro de homoj kun la celo eldoni libron estontece?. Kial tiu libro ne povas esti omaĝo al centjariĝo de la Grupo Esperantista de Bilbao?.




Unua fronttitolo de "Nia Ponto", aperinta antaŭ pli ol dudek jaroj

## HARRY POTTER EN ESPERANTO.

Usonaj esperantistoj, en kunlaboro kun ELNA, tradukis la unuan libron de Harry Potter al esperanto. Ĝis nun la kontaktoj de ELNA kun la agentejo por ricevi la eldonrajton restis vanaj. Por helpi en tiuj kontaktoj, ni serĉas subtenon ĉe esperantistoj. La celo simple estas montri ke intereso pri tiu traduko ekzistas. Se vi pretas helpi, simple subskribu la liston cxe http://www.hp-esperanto.com/ Ni sxatus rikolti kiel eble plej multajn subskribojn en plej malmulte da tempo!

*Marion Belisle, Svislando (per retpoŝto)*

## ĈU U.K. 2009 EN BJALISTOKO?

La 13-an de januaro 2006 kunsidis en Bjalistoko la konsilantaro de la Fondumo Zamenhof (...) Dum la kunsido estis lanĉita la ideo organizi la 94-an Universalan Kongreson de Esperanto en 2009 (150 jaroj post la naskiĝo de L.L. Zamenhof) en Bjalistoko.

*("Esperanto". N-ro 1191. Aprilo 2006)*

## LA MEMBRARO DE UEA EN 2005.

Je la fino de 2005, UEA (Universala Esperanto-Asocio) kalkulis 6.107 individuajn membrojn kontraŭ 5.856 de la jaro 2004. Samtempe, la revuo "Esperanto" havis 4.084 abonantojn.

*("Esperanto". N-ro 1191. Aprilo 2006)*

## RUSIO. UK-NIVELA MENCIADA OFTECO.

Hodiaŭ Esperanto kaj esperantistoj menciiĝas en Rusio simile ofte kvazaŭ ĉe ni okazus UK. Oni mencias Esperanton en "babilprogramoj", oni mallonge priskribas ĝin en la plej rigardataj novaĵprogramoj, oni montras reklamojn kun verda stelo ...

La kialo estas, ke hodiaŭ en la plej rigardata rusia Unua Kanalo startas detektiva seriaro "Kazaroza", la agado de kiu parte okazas en Esperanto-klubejo en 1920aj jaroj. La murdo (kia detektivaĵo sen mistera murdo?) okazas dum koncerto en la klubo, kiam kantistino Kazaroza (kasarosa) kantas en Esperanto ...

Oni promesas montri la etoson de tiu postrevolucia epoko, etoson de idealisma movado –esperantistoj- kaj, kompreneble, strečan psikologian intrigon. La filmo estas bazita sur la samnoma romano de konata rusia verkisto Leonid Juzefovič. En sia unua versio, aperinta en 1981, la romano nomiĝis "Klub Espero". La montrado de la filmo daŭros dum tri tagoj.

En la matena novaĵprogramo de la Unua Kanalo sonis prezento de "Kazaroza" – kun tre pozitiva karakterizo de Esperanto. Mi persone unuafoje aŭdis la vorton "Esperanto", "esperantist" en la televidaj novaĵoj de Ostankino dum la lastaj dudek jaroj.

*("Esperanto aktuell". 2006/2)*

## PETICIO POR ESPERANTO ĈE UN.

Eble vi ne estas informitaj pri la peticio por Esperanto, kiu celas atingi ke UN (Unuiĝintaj Nacioj) akceptu Esperanton kiel internacian lingvon. Necesas 1 miliono da subskriboj. Mi decidis informi vin pri la eblo kaj peti vin viziti la hejmpaĝon kaj decidi pri via apogo kaj disvastigi la eblon.
http://www.petitionspot.com/petitions/ESPERANTO
Helga Farukuoye

*("Esperanto aktuell". 2006/2)*

## UEA-Prezidanto kandidatighas kun la amikoj de Milosevic, de Hamaskaj Hezbollah

Gazetara komuniko de Esperanto-Radikala Asocio

Renato Corsetti, serioza kaj neutrala UEA-Prezidanto, okaze de freŝdata Roma komununa voĉdonado kandidatiĝis por Partito dei Comunisti Italiani (la Partio de italaj komunistoj www.comunisti-italiani.it) kaj en Libera Folio difinis "neserioza" (www.liberafolio.org/2006/boninominstro/) la agadon de radikalaj esperantistoj sin montrante tiele kiel perfekta kaj ortodoksa itala komunisto.

Fakte samopinias kiel li la amikoj de sia Partio, la komunistoj ĉinaj, vietnamaj, laosaj kaj kubaj, kiuj plurfoje klopodis (sed ĉiam senrezulte) kune kun eksa KGB Vladimir Putin forpeligi Radikalan Transnacian Partion, kies konstituanta asocio estas ankaŭ ERA, de Unuiĝintaj Nacioj pro sia plena engaĝiĝo por defendi la civilajn rajtojn de popoloj subpremataj de la amikoj de amikoj de Corsetti..

Ni bone rememoras, cetere, ke dum la Radikala Transnacia Partio kaj ERA kolektis en plena soleco subskribojn por procesigi ĉe Haga tribunalo la "eksekutiston" de Beogrado (kaj precipe de Sarajevo kaj Sebrenica), tiam ankoraŭ potencan, la sampartianoj de Corsetti partoprenis la kongreson de la partio de Milosevic kaj omaĝis al la laŭvica diktatoro.

Ni ne parolu pri Hamas kaj Hezbollah, teroristaj organizoj kun kiuj la partio de Corsetti havas bonajn interrilatojn kaj kontaktojn, kvankam ili deklaras malkaŝe sian volon elimini Israelon (kaj israelanojn). Kion pensus pri tio judo Zamenhof?

La radikalaj esperantistoj estas sekve de tio fieraj ke ili ne estas seriozaj kaj neutralaj kiel Corsetti kaj liaj amikoj kaj amikoj de liaj amikoj.

*Info-ERA <info@lingvademokratio.org> 12/06/2006*

NOTO: Ni reproduktas tiun-ĉi strangan sciigon, kiu alvenis per la reto. Ni ne scias ĉu estas vera, nek la celo de ĝia diskonigo. Tamen, kurioza certe estas kaj montro de la tre diversaj homoj, kiuj estas en Esperantio..

## NIAJ AKTIVULOJ ...



### JOSÉ LUIS BRINGAS TELLECHEA (Bilbao, 1934)

José Luis Bringas naskiĝis en Bilbao en 1934, ene de esperantista familio, tiel ke la patro parolis la internacian lingvon. Lia unua kontakto, krom la familia, kun la esperantistaro de Bilbao okazis en la jaro 1957, post la militservo.

Tiam, lia patro, blindulo, apartenis al tiuj membroj de O.N.C.E. (Hispana Nacia Blindula Asocio), kiuj estis samtempe anoj de la ĵus reaktivigita Grupo Esperantista de Bilbao.

Kiel lernanto, li partoprenis la kurson de la studjaro 1957/58, gvidata de Luis de Otaola kaj Julio Juanes en la lernejo de Indaŭĉu (kvartalo de Bilbao). La kurson partoprenis pli ol 50 homoj, kio faris ke la lernantoj estu dividitaj en du klasejoj.

Post tiu kurso, kies fino okazigis solenan kunvenon en la ĉefsalono de la lernejo, kun amasa ĉeesto de lernantoj kaj ties familianoj, dum la unua kunveno de la estraro de la Grupo, estis nomumita voĉdonanto, jam en la jaro 1959. Restis en tiu posteno ĝis la jaro 1963; denove elektita por la periodo 1966/70; Sekretario de 1971 ĝis 1975; Prezidanto de 1975 ĝis 1977; Vicprezidanto de 1977 ĝis 1981; kaj denove Prezidanto de 1990 ĝis 1992.

Samtempe, dum tiuj jaroj, gvidis diversajn kursojn kaj, kune kun **Pedro Benedicto**, aktiva esperantisto, kiu jam mortis, organizis kampanjon por diskonigi esperanton en bazlernejoj. Frukto de tiuj prelegoj estis la organizo de kurso por infanoj.

Alie, danke al helpo de aliaj entuziasmuloj, kiel **Larrouy** kaj **Altuna**, eblis la partopreno, kun stando, en la bilbaoa internacia foirejo, de kie oni disdonis informojn kaj montris la diversajn librojn kaj afiŝojn ekzistantaj ene de Esperantio.

Ankaŭ partoprenis en la organizado de diversaj renkontiĝoj kun francaj samideanoj, nome, en Bilbao, Huesca kaj Biarriz.

Por fini, ni rememoros pri lia prezidanteco dum la hispana kongreso okazinta en Bilbao en la jaro 1989, lia vicprezidanteco dum la eŭropa kongreso de la jaro 2004 kaj ke li estas la nuna Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao. Sed precipe, li estas tre bonkora homo, ĉiam preta helpi en kia ajn tasko: de balaisto ĝis plumbisto, de kantisto ĝis pianisto, de rakontisto de humuraĵoj ĝis bonega amiko de ni ĉiuj.

# 2006 !!!

# LA E-GRUPO DE BILBAO 100-JARIĜAS